Protokolo de la Pedagogia Tago de Bretonio

Sabaton la 18-an de Junio 2005

- Saint Brieuc -

1/ Celoj

Dum la pasinta Ĝenerala Asembleo de la Federacio Esperanto-Bretonio la 10-an de aprilo 2005, okazis interalie diskutado pri Esperanto-instruado. Oni faris 2 konstatojn: unuflanke, la Esperanto-instruistoj de Bretonio indikis sian emon interŝanĝi siajn spertojn pri pedagogiaj metodoj por instrui la lingvon, ktp. Aliflanke, kelkaj kluboj indikis, ke en siaj respektivaj urboj, estas pluraj homoj, kiuj deziras lerni Esperanton, sed ne estas sufiĉe da homoj kompetentaj por gvidi Esperanto-kurson: resume, mankas Esperanto-instruistoj.

Tial estis decidite fari ĉiujare unu *pedagogian tagon* kun 2 celoj: la Esperanto-instuistoj de la regiono povus interŝanĝi tie siajn spertojn, kaj la homoj, kiuj dezirus iam instrui la lingvon povus tie formiĝi, lernante pri la pedagogiaj metodoj por Esperanto-instruado (kaj tiuj, kiuj volus pliprofundigi tiun aspekton povos iri ankaŭ al la "kurso por instruistoj" ĉe la staĝo de Plouezec).

Ĉar la laboro de Sébastien Erhard kiel junul-dungito ĉe Esperanto 22 finiĝos fine de aŭgusto 2005 kaj li poste foriros el la regiono Bretonio, li do estis elektita por organizi tiun unuan "*pedagogian tagon*". Tiel li povos transdoni la spertojn, kiujn li akiris dum siaj 5 jaroj da laborado ĉe Esperanto 22. Sed ankaŭ parto de la tago estos rezervita por interaktiva interŝanĝo inter la partoprenontoj de tiu tago.

2/ Partoprenintoj

Entute partoprenis tiun tagon 15 homoj el 7 urboj/kluboj (3 departamentoj).

Venis el Saint-Brieuc (22):

- Pierre CARDONA – kortep@club-internet.fr
- Denis-Serge CLOPEAU - clopeau.denis@wanadoo.fr [parte partoprenis]
- Manjo CLOPEAU – manjo.clopeau@wanadoo.fr [parte partoprenis]
- Sébatien ERHARD – hodos@free.fr
- Laurent PEUCH – ltpeuch@hotmail.com
- Amapola TRIGUERO – amapola.triguero@sante.gouv.fr

Venis el Plouézec (22):

- Jeanne POUHAER (pere de Louise Rigault: andrigault@wanadoo.fr)

Venis el Rennes (35):

- Sébastien FERRÉ – ferre@irisa.fr
- Eléonore JOUFFE – eleonore.jouffe@gmail.com
- Bert SCHUMANN – bert.schumann@free.fr

- Juliette VOECKLER – juliette.voelcker@club-internet.fr

Venis el Iffendic (35):
- Josette DUCLOYER – jpducloyer@club-internet.fr

Venis el Vannes (29):
- Jacqueline AHIER – ajakima@aol.com

Venis el Sarzeau (29):
- Ewa SCOURZIC – ewascourzic@gmail.com

Venis el Pontivy (29):
- Marielle GIRAUD – liber.terre@wanadoo.fr

Gvidis la disvolviĝon de la tago kaj la diskutojn Sébastien ERHARD.
Notis por la protokolo Eléonore JOUFFE.

3/ Disvolviĝo de la tago

Matene, je la komenco, ĉiu prezentis sin kaj siajn motivojn por tiu pedagogia tago. Baze de tiuj prezentoj, jam aperis kelkaj demandoj aŭ temoj diskutotaj dum la tago. Oni ekparoletis pri la diversaj metodoj por Esperanto-instruado.

Poste, Sébastien ERHARD komencis prezenti prototipon de la « pedagogia valizo », kiu entenas la plimulton de liaj produktaĵoj (pedagogiaj iloj, ekspozicio, prelegoj...) dum la 5 lastaj jaroj.

Tuj post la manĝo, Sébastien faris sian 30-minutan fulmo-kurson, kiu ebligas prezenti tre rapide la ĉefajn punktojn de la lingvo Esperanto.

Sekve de tio, oni komencis diskuti pri kaj la ĵusa kaj la matena prezentoj. Oni poste mallarĝigis tiujn parolajn interŝanĝojn al komunaj pripensoj pri metodologio kaj pedagogio ĝenerale.

Fine, oni sintezigis la ĉefajn diskut-punktojn de la tago kaj la konkludojn, al kiuj oni alvenis.

4/ Konkludoj

Listigante la diversajn lernolibrojn por Esperanto, oni konstatis, ke ekzistas multaj lernolibroj por memlernado sed mankas unu bazan lernolibron vere taŭgan (kaj prefereble modern-aspektan) por instruado de Esperanto en kurso kun instruisto.

Oni parolis pri la ekzamenoj de la Franca Instituto de Esperanto, kiuj estas bonaj iloj por, ke la lernantoj taksu sian nivelon. Se oni organizas ekzamenojn, tiam ili iĝas celo por la lernantoj (kaj ankaŭ por la instruisto). Sed pri ekzamenoj la problemo estas, ke mankas informoj de la Franca Instituto de Esperanto (kiel oni povas organizi ilin, kion ili detale enhavas, ktp.). Mankas ankaŭ ekzemploj de la pasintaj ekzamenoj (simile al la t.n. « Annales ») por trejnigi la lernantojn por la

ekzameno. Oni proponis jenan ideon: se oni farus lernolibron por lernado kun instruisto, tiam oni povus meti tiujn tejn-ekzamenojn fine la lernolibro.

Koncerne pedagogion, multaj indikis sian deziron uzi la novan « pedagogian valizon » plej baldaŭ kiel eble. Ĉar ĉiuj parolis pri la materialoj uzataj en siaj respektivaj kursoj, oni eksenti bezonon pri ejo por interŝanĝi tiujn materialojn. Jen estas kelkaj eblaj solvoj por tio:

- la TTT-ejo de edukado.net, kiu havas lokon por tia instrumaterial-interŝanĝo ;
- la TTT-ejo de la FEB (esperanto.bretonio.free.fr), kie oni povus krei specialan paĝon por tio ;
- la asocio por Esperanto-instruistoj GEE ;
- oni ankaŭ proponis, ke se oni refaros tian pedagogian tagon, ĉiu antaŭe kunportu materialojn por interŝanĝi ilin surloke.

Oni ankaŭ parolis pri kursoj en lernejoj, kaj multaj raportis, ke ne facilas instrui al lernejanoj aŭ mezlernejanoj (kolegioj, aŭ liceoj), nek facilas malfermi kursojn ĝenerale en lernejoj ĉar tio postulas multe da streboj. Rilate tiun punkton, kelkaj konstatis tion: ĉar nuntempe niaj fortoj estas sufiĉe malmultaj kaj la rezultoj estas ofte malgrandaj (ĝenerale la lernantoj akiras malmulte pri la lingvo kaj poste ne daŭrigas kaj « malaperas »), eble ne indas malŝpari tro da fortoj por tiom malgranda rezulto. Oni prefere faru laŭ la kapabloj de la instruisto kaj laŭ la bezonoj/deziroj de la lernantoj: se la lernantoj volas nur fari al si ideon pri la lingvo, anstataŭ fari tutan kurson tempo-raban por tio, pli utilas uzi la fulmo-kurson aŭ la dokumenton PakEo por tio... Kaj se la lernantoj poste deziras pli studi pri la afero, tiam oni povas proponi al ili aliĝi al iu jam ekzistanta kurso kun instruisto, aŭ gvidi ilin al interreta kurso (aŭ vendi al ili la KD-romon Lernu!).

Fine, pri disvolviĝo de la kursoj laŭ la jaroj, estis diversaj diskutoj. Iu konsilis tion: ekde la unua kurso, la instruisto konatiĝu kun siaj gelernantoj, ŝli prenu la tempon por malkovri iliajn motivojn sed ankaŭ iliajn interesojn kaj hobiojn ekster Esperanto, tiel ŝli povos orientigi la kurson kaj la studotaj aferoj laŭ la interesoj de la lernantoj. Poste, fine de la unua jaro da lernado, oni do povas proponi ekzamenojn por taksi kian nivelon atingis la lernantoj. Kaj se la lernantoj volas ankoraŭ studi la lingvon « surloke » (kaj ankoraŭ ne sentas sin sufiĉe lertaj por pratiki la lingvon vive: ekz. per korespondado, per kongresoj, vojaĝante, ktp.), tiam oni konsilas ne fari « veran » kurson dum la postaj jaroj (ĉar tiam, la lernantoj ofte instaliĝos en tro komforta kaj sekuriga situacio, ĉiujare kursante sed ne aŭdacante vere ekpraktiki la lingvon kaj tio povas igi kelkajn al « eternaj komencantoj »). Anstataŭ formala kurso, prefere oni faru aliajn aktivaĵojn per Esperanto (kaj ne nur *pri*, male de klasika kurso). Jen kelkaj ideoj de aktivaĵoj, kiujn oni pridiskutis (kaj tiaj aktivaĵoj eĉ povas fine rezultigi produktaĵojn eventuale interesajn por Esperanto kaj ties kulturo):

- tradukado de film-subtitoloj aŭ de libro ;
- filmeto (baldaŭ aperos la Internacia Televido ITV en Esperanto kaj tiaj aferoj povus eble interesi ilin) ;
- teatraĵo ;
- rol-ludoj (ekz. la ludo « Les loups-garous de Thiercelieux ») ;
- bildstrioj ;
- kanto-verkado aŭ/kaj koruso-kantado ;
- tradukado de reklamoj ;
- recenzoj de libroj, revuoj ;
- ktp.